
EKE esperanto

**Kunveno: merkredon la 20an de novembro 2024a**
**je la 20.00 h. en “De Uitwijk”,**
**Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven.**
**tel. 040-2450590.**

# Libroj

La programon prizorgos: *Rob*.




Ĉiu el ni prezentos al la klubo unu libron. Aŭ, se vi tiel deziras, eventuale eĉ libroserion.

Estus interese se tiun ĉi fojon denove la libro(j) kiu(j)n vi prezentos al ni, vi **ne** legis en *esperanto*. Ĝi (ili) eble eĉ *ne ekzistas* en esperanto. Sed kiu ajn la koncerna lingvo, vi ja *prezentu* vian elekton al ni *en esperanto*. Ĉu vi legis ĝin (ilin) en la nederlanda, la angla, la germana, la franca aŭ en iu ajn alia lingvo: tio ne gravas.

Ne gravas antaŭ kiom da tempo vi legis la libro(j)n. Ĉu antaŭ du semajnoj, ĉu antaŭ du monatoj, ĉu antaŭ du jardekoj... Ĉiu via elekto estas bona.
Estus interese se vi povus kunporti la libro(j)n por montri al ni.

Preparado do nepre necesas.